

LA LAMPIRO

60-a jaro n-ro 155 2019:1

ARTHI STOR O

Pentraĵo Sur
Muro

Ekde Mezepoko
Ĝis Rokoko

La Lampiro 155:1

EASP

LIBROSERVO

easp.org.br/kuriero



La Lampiro

60-a jaro

n-ro 155 2019:1

Propra sidejo

Rua Faustolo,
124 - Água Branca
05041-000 São Paulo,
SP - Brazilo
Telefonnumero:
(11) 3862-1183
easp.org.br
contato@easp.org.br

Jarkotizo por 2019

Simpla MembroR\$ 150,00
Subtena MembroR\$ 300,00
Ŝtatinterna Membro ..R\$ 75,00

Deĵoroj:

merkrede: 10h – 16h;
ĵaŭde kaj vendrede:
13h – 17h; sabate: 9h – 13h.

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sérgio Viana

(psviana@terra.com.br)

Grafikaranĝo: Sajjad Dashti Nezhad

Revizianto: Paulo Sérgio Viana, José

Roberto Tenorio

Estraro

Prezidanto: Genildo Martins Coelho

Vicprezidanto: Marcos Zlotovich

1-a Sekretariino: Anna Lobo de Carvalho

2-a Sekretariino: Sidnéa da Conceição
Beall

1-a Kasisto: José Roberto Tenorio

2-a Kasistino: Vakas

Propaganda Direktorino: Cristina C. de
Graaf

Konsilantaro

Paulo Sérgio Viana, Audino Castelo

Branco kaj Aparecida de Souza Araújo

Anstataŭantoj

José Mauro Progianta kaj José Martins
Coelho

La redaktanto ne respondecas
pri la subskribitaj artikoloj



La Lampiro 155:1

ENHAVO

6 “La Meteoro“

7 Poezio Vivas

9 MODERECO: LA VIRTO, KIU
RAJTIGAS PLEZURON

10 ESPERANTA KULTURO

11 DECEMBRO FORPORTIS DU
EMINENTULOJN

12 Aquaman - La Filmo

15 LA HOMO, KIU VIDIS LA
SENFINECON

17 EL LA VIVO DE FAJROBRIGADISTO

18 OCEANOJ RAPIDE VARMIĜAS

19 PENTRAJO SUR MURO

22 LINGVAJ RESPONDOJ DE
FRANCISCO WECHSLER

24 ENTUZIASMA EVENTO EN
LEGIO DE BONA VOLO

VORTOJ DE LA PREZIDANTO

Nova jaro ĉiam devas komenciĝi per novaj planoj kaj nova energio. EASP rekomencas sian vivon kaj ni alvoku la membraron por revigligo de nia laboro. Unu el la plej urĝaj taskoj estas la reformulado de la Departamentoj pri Edukado kaj Informado. Temas kompreneble pri du esence gravaj taskoj de nia movado: informi pri nia lingvo kaj kulturo al la ekstera publiko, kaj instrui la lingvon mem. Malgraŭ la intensa uzado de interretaj instrumentadoj, en la moderna nuntempo, ni pensas, ke klasa ĉeesta instruado de la lingvo ankorau devas esti disponebla. Ni do alvokas niajn membrojn, kiuj emas labori sur tiuj du kampoj, ke ili sin prezentu por la agado.

Aliflanke, nia kluba vivo devas daŭri. Ni invitas al niaj kulturkunsidoj, okazontaj laŭprograme en la lasta sabato de ĉiu monato. Alvenu, kleriĝu kaj praktiku la lingvon en amika etoso!

VORTOJ DE LA REDAKTORO

Nia Lampiro rekomencas novan jarkolekton kun pluraj defioj. Unu el ili estas prezenti materialon por legado, kiu klerigu, interesus, motivu kaj allogu. Por tio ni bezonas, ke verkemuloj pretu helpi la redaktanton. Ni estas certaj, ke multaj EASP-anoj havas bonajn ideojn, povas ilin publikigi en nia revuo. Por tio ĝi taŭgas, por funkcii kiel kanalo de esprimado de nia samideanaro. Jen nia amika invito: ne hezitu sendi al ni viajn tekstojn, ĉu literaturajn, ĉu eseajn, ĉu primovadajn, ĉu simple informajn pri via agado en nia verda mondo. Memor: nia revuo devas speguli la spiriton de la membraro de EASP kaj ĝiaj simpatiantoj.

Estu nia unua numero en 2019 okazo ankaŭ por danki nian iran samideanon Saggad Dashti por lia valorega kontribuo en la grafika aranĝo de nia revuo. Ni esperas kalkuli je tiu trafa kunlaborado. EASP dankegas!

“La Meteoro”

de Sándor J. Bako kaj Claude Piron
Eldonejo Vieno: IEM, 2002, 132 paĝoj

Rakonti atentokaptajn historietojn estas bela arto. Pro la mallongeco de la verkoj, ĝi ŝajnas facila, sed tio estas nepra mistakso. Konstrui koheran, verŝajnan kaj interesan epizodon per malmultaj paĝoj postulas grandan precizecon en la uzado de vortoj, konstruado de frazoj kaj de “atmosfera”. Se la aŭtoro ne sufiĉe talentas, tiam rezultas nenatura, kruda, anekdoteca, senkolora nura raporto. Multaj verkistoj en la universala literaturo sin dediĉis al tiu malfacila ĝenro. Ĉeĥov estis unu el la majstroj. Lastatempe, oni radikaligis la malfacilecon per la kreado de la tiel nomataj “mikrorakontoj”, kiuj celas transdoni tutan historion per malmultaj linioj. Granda defio!

La volumo “La Meteoro” estas sukcesa kolekto de nelongaj rakontoj. En la unua parto de la volumo troviĝas la rakontoj de Claude Piron, nia konata, rekonata, aprezata stilisto. Denove li konfirmas sian kapablon transdoni per simplaj elementoj de nia lingvo esprimojn plenajn de eleganta viveco kaj psikologio. Kelkaj el la tekstoj estis faritaj per “facila” lingvo, tio estas, per la listo de la plej uzataj vortoj de la revuo Kontakto. Do, didaktikaj. Ne pensu tamen, ke la facileco faras la tekstojn naivaj kaj infanecaj. Tute

ne! La temoj estas ĉiam pensigaj, eĉ instigaj, foje amuzaj kaj provokaj. Piron denove pravas, ke oni povas pensi funde, sen neologismoj. El tiu unua parto, mi elstarigas la rakonton “Timiga Maljuniĝo”, kiu temas pri infano forlasita kaj adoptita de fremda familio.


La dua parto konsistas el rakontoj de Sándor J. Bako (1915-1990), hungara Esperantisto, kiu pasigis parton de sia vivo en siberiaj gulagoj kaj poste migris al Usono. Li publikigis plurajn volumojn de rakontoj, kelkajn kune kun rakontoj de Piron. Ankaŭ liaj historioj estas tre viglaj, sed iom malsimilaj al tiu de la sviso. Ankaŭ lia stilo estas simpla kaj eleganta, sed iom pli “ornamita”. Liaj verkoj estas pli emociaj, iom pli sentimentalaj. Kelkaj el ili estas vere poeziecaj, kiel la kortuŝa “La meteoro”, kiu pruntis sian titolon al la tuta libro. Ĝi temas pri la revoj de eta orfo en indifera mondo.

Leginda libro estas “La meteoro”! Pro la lingvo, pro la enhavo, pro la plezuro.

(P.S.V.)

POEZIO VIVAS

Maria
Nazaré
Laroca



*De nia estimata Poeto kaj kunlaboranto de La Lampiro,
aŭtoro de pluraj volumoj de poemoj en la portugala lingvo
kaj en Esperanto, ni ricevis la jenan korespondadon.
Fierigas nin, ke ŝi estas rekonata eksterlande pro sia verkado.
Gratulon al la kara Poeto!*

ELKORA INFORMO

Mi dividas kun vi mian ĝojon! Esperanto estas vera lingva ponto inter popoloj de malsamaj kulturoj. Nia lingvo estas mirindaĵo! Ĝi perme-
sas, ke homoj el foraj landoj legu kaj komprenu poemojn naskitajn el ro!

nia koro! Mi tion klarigos per kelkaj ekzemploj.

El Nagykanizsa, Hungario, samideano kaj amiko v. Szabadi Tibor J. pasintjare tradukis du poemarojn miajn al la hungara lingvo, nome **Penseroj** kaj **Birda grundo** (*Chão de pássaros*). Ĉijare, je la fino de januaro, mi

ricevis hungaran Antologion senditan de li. Vi imagu mian surprizon: kelkaj el miaj poemoj aperis en lia urba **Antologio** post la aprobo de redaktoroj, legu laŭ konkurso. Tio estas granda honoro!

Kaj mi aldonas aliajn interesajn ekzemplojn. El Israelo, samideano

Amir Naor, redaktoro de la retejo


“**Verkoj** – Hejmo por verkistoj kaj legantoj” afable ĉiam publikigas miajn esperantaj verkojn: <http://verkoj.com/verkistoj/maria-nazare-laroca/>

El Turkio, S-ro Vasil Kadifeli, preskaŭ

ĉiam amike aperigas miajn poemojn en la enhavoriĉa revuo **Turka Stelo**; *La revueto de la turka esperantistaro*.

Ankaŭ tion faras S-ro Vejdo, el Ĉinio, redaktoro de **Penseo**; *Monata Beletra Revueto en Esperanto*.

Per tiu ĉi grava revuo, nome **La Lampiro**, mi deziras tutkore esprimi mian dankemon al D-ro Zamenhof kaj al Esperanto, kiu ebligas tian magion!



MODERECO: LA VIRTO, KIU RAJTIGAS PLEZURON

José Mauro Progiante

“Estas trajto de saĝa homo uzi la aĵojn kaj per ili ĝui plezuron plej
Spinozo

Estas kristanoj, kiuj kredas, ke Jesuo transformis akvon en vinon, tamen ili ne trinkas vinon, dirante, ke virta homo ne devas trinki alkoholaĵon. Tiaj personoj evitas ankaŭ aliajn plezurigajn aferojn, celante ĉastecon. La rezulto estas, ke multaj el ili estas malgajaj, ĉar tiu sinteno kontraŭas iliajn dezirojn.

Kelkaj homoj fakte devas eviti certajn situaciojn, pro tio, ke antaŭe ili montriĝis ne kapablaj sin regi kaj troe faris aŭ konsumis ion. Ili estas malsanuloj, la pravigo por ilia abstinenco estas klinika, ne religia aŭ morala.

Modereco estas virto de sana persono, kiu plenumas siajn dezirojn sen kulposento. Kaj ĝi signifas ne ĝui malpli, sed ĝui pli bone. La plezuro de la moderulo estas pli pura, pli plena, kaj ne dependas de trosatiĝo. Lia gusto estas regata, kultivata. Li komprenas, ke manĝaĵoj, trinkaĵoj, parfumoj, ornamaĵoj, muziko, ludoj, spektakloj, ĉio povas esti fonto de plezuro, kondiĉe, ke li respektu la limojn de sia korpo kaj ne damaĝu aliajn.


La rilato inter la homo kaj la plezuro povas esti virta aŭ ne. Ĝi estas virta, kiam la homo estas la mastro, tio estas, kiam li regas la plezuron. Kontraŭe, tiu rila-

to estas malvirta, malsaneca, kiam la homo estas sklavoj de la plezuro.

Kiam ni trinkas glason da vino, sciante, ke tion ni faras ĉar ni volas fari, ke ni libere povas decidi ne trinki ĝin, la plezuro devenanta de tiu trinkado estas viviga, multe pli bona ol tiu, de homo regata de siaj deziroj, kiu ne kapablas eviti ebriiĝon.

Kiel ĉiuj virtoj, la modereco situas meze de la vojo. Ĝi malproksimas de la malgajeco de tiu, kiu dependas de senĉesaj plezuroj por vivi, kaj ankaŭ de la malgajeco de tiu, kiu ne kapablas senti plezuron. Meze de la enuo de manĝegemulo kaj de anoreksiulo estas ĝi, alportanta al ĝia posedanto intensan ĝojplenan ĝuon.

Dum la malmoderulo estas devigata konstante porti postuleman mastron (sian korpon), la moderulo rigardas sian korpon kiel ilon por plezuriĝo. La unua avido estigas ĉiam novajn plenumendajn dezirojn, dum la dua serene atendas, ke la deziroj alvenu spontane, ĉar li preferas kvaliton anstataŭ kvanto.




ESPERANTA KULTURO

INTERESA NOVAĴO EN
INTERRETO:
UEA.FACILA.ORG

Lastatempe, multaj homoj lernas Esperanton per la anglalingva, hispanlingva kaj portugallingva versioj de DUOLINGO. Tio estas tute nova, neatendita fenomeno, kiu eble malfermas novan tempon por nia lingvo. Tiuj novuloj tute ne scias pri la tradicia Esperanto-movado kaj eble forlasos la lingvon, se ili ne trovos post sia lernado utilecon rilate kulturon. Estas grave montri, ke la Esperanta Kulturo ekzistas kaj estas tre alloga. Fine, oni lernas lingvon por uzi ĝin!

Rilate al tio, la retejo edukado.net pioniris. Ĝi entreprenis taŭgan manieron allogi tiujn novulojn al nia komunumo. Legu mem en tiu retejo. Nun, nova iniciato, fare de Universala Esperanto-Asocio, aldonas kontribuon sur ĉi tiu kampo. Ĝi lanĉis novan retejon uea.facila.org. Bela iniciato! En ĝi oni trovas facilajn tekstojn kaj filmetojn pri plej variaj temoj de ĝenerala intereso. Ili estas alireblaj ankaŭ de homoj, kiuj ne estas membroj de la asocio. La tekstoj ricevas klasifikon laŭ la grado de facileco, kaj oni povas komenti sub ili. Estus tre oportune, se kluboj kaj asocioj, kursestoj kaj simplaj rondoj uzus tiun riĉan materialon por progresigo de komencintoj en nia lingvo.



BALDUR RAGNARSSON KAJ AMÓS OZ

DECEMBRO FORPORTIS DU EMINENTULOJN


La monato decembro 2018 forportis de nia mondo du gravajn, omaĝindajn homojn: la islandano Baldur Ragnarsson kaj la israelano Amós Oz.

La unua estis granda kontribuanto al nia Esperanta kulturo. Li naskiĝis en la jaro 1930 kaj Esperantistiĝis en 1949. Li laboris kiel instruisto kaj agadis por nia afero sur pluraj kampoj. Li estis prezidanto de Islanda Esperanto-Asocio, vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio pri kulturo kaj edukado, membro de la Akademio de Esperanto, estro de la Belartaj Konkursoj de UEA kaj redaktoro de la elstara revuo Norda Prismo. Lia verkaro estas tiel grava, ke oni indikis lin por la Nobel-Premio en Literaturo. Li estis eminenta poeto, unu el la iniciatintoj de aŭdaca modernismo, en tempo kiam parnasismo ankoraŭ estis konsiderata unusola modelo. Li ankaŭ solide eseis kaj tradukis. Valoras la penon akiri la volumon "La Serena Lingvo", kiu enhavas lian tutan verkaron. Vere densa kontribuo al nia Esperanta kulturo!

La dua forpasinto, la israelano Amós Oz, ne estis Esperantisto, sed grava simpatianto. Lia verkaro estas riĉega, ne nur en fikcio sed ankaŭ en la esea arto. Li naskiĝis en la jaro 1939, en Jerusalemo.

Lia patrino sin mortigis kiam li estis ankoraŭ adoleskanto. Lia reago estis ekloĝi en kibuco kaj ŝanĝi sian propran nomon. Talenta prozisto, li bildigis la vivon en Israelo, ĉiam kun la inklino al pacemo. Kvankam li partoprenis en militoj, tamen li dediĉis sian tutan intelektan karieron kaj energion al defendado de paco inter Israelo

kaj araboj/palestinanoj. Tio signifis fortan engaĝiĝon en la politika mondo kaj alfrontadon de multaj fanatikaj kritikantoj. Pro tio li verkis interalie brilajn tekstojn pri la neceso kontraŭi fanatikecon en nia moderna mondo. Ankaŭ lin oni indikis por la Nobel-Premio, sed ĝi neniam estis aljuĝita - bedaŭrinde. La ligo inter Oz kaj Esperanto troviĝas en unu el liaj libroj - "Inter amikoj" - nome kolekto de rakontoj, el kiuj la lasta temas pri Esperantisto. Ĉi tiun rakonton israela Esperantisto tradukis al Esperanto. La kontakto inter israelaj Esperantistoj kaj Amós Oz estis amika kaj simpatia. Ni ne forgesu: la plej bela omaĝo al tiaj homoj kiel Baldur Ragnarsson kaj Amós Oz estas... legi iliajn librojn.



AQUAMAN

La Filmo – Paulo Nascentes

La fakturado superas tricent kvardek ses milionojn da usonaj dolaroj en internaciaj vendejoj. Furoras la grandioza filmo *Aquaman*, kiu ebligas plurajn *legadojn*. La belega teknologio 3D al ni rivelas ĉiun tavolon de nia ena Kavoj, malkomforte vidata ekde la egoo. Aparte, min tuŝas la sennombro da elementoj de la analiza psikologio de Karlo Gustavo Jung. Elstaras la sagao de l' heroo, proceso de individuigo, travojaĝo de ĉiu persono serĉe al Si mem, nome fariĝi la tutpova reĝo, kiu oni ja esence estas. Tipa, la naskiĝo de la infano **Arturo**, filo de lumtur-gardisto **Thomas (Teruera Morrison)** kun la reĝino **Atlanna (Nicole Kidman)** de la mita, legenda, perdita Atlantido. Nia vojo al la Maro de la nekoncio mergiĝinta tamen en Si mem iras de eta konscia surfaco al la Tuteco, kie enaj kaj eksteraj mondoj, konscia kaj nekonscia, ĉiam estis kunaj atende la renkonton de la infano **Arturo** kun la grandpova **Aquaman**, kiu elakviĝas dum la proceso mem de la serĉo de la atlanta regno, prapatra *locus*. Malnecesas memori, ke ne temas pri egoa povo, sed pri la aŭtora povo, povo de la Esto, la Nemanifesto ĉeestanta la manifestajon. Ĉiokaze, *esti manifestata* signifas esti mane-ĉe-mane kun la Festo, la Bonaj Festoj. Jen la reakordigo kun ĉiu Revivigo kaj Morto en la senfina Vivo. Kiuj aliaj jungaj konceptoj sin prezentas en la riĉeco de la filma irvojo, la majstra reĝisoro de James Wan?

Du mondoj ŝajne apartigitaj vivas nesolveblan konflikton, tiun de la tero kun surfacaj akvoj kaj tiun alian de la profunda, nesondebla Oceano. Nia Oceano estas majuskla, enloĝigata de abismaj, kompleksaj estaĵoj. Jen bela metaforo de niaj aspektoj konscia kaj nekonscia. Laŭ Jung, krom la persona,

ekzistas ankaŭ la kolektiva nekonscio, kiu nin ampleksas, kompletigas, konstituas. Ĝi estas loĝejo ne nur de retenitaj aspektoj ne akceptitaj de la konscio, sed ankaŭ de malfortaj energioj nekapablaj transiri la sojlon de la konscio. Arketipaj fortoj, mitologiaj figuroj, strangaj monstroj loĝas ie niamense. Ili konsistigas la kompleksojn, kiuj estas dotitaj de aŭtonomio. Foje ni estas de ili kaptitaj. Tiam ni nin malkonas. Tiu kiu tiel agis ne estas mi!

En la listo de aktoroj brilas **Jason Momoa (Aquaman)**, **Amber Heard (Mera)**, **Nicole Kidman (Rainha Atlanna)**, **Patrick Wilson (Orm)**, **Willem Defoe (Nuids Vulko)** e **Dolph Lundgren (Rei Ne-reus)**. Kaptas nian atenton la sceno priskribita kaj analizita de kritikisto:

*“Venkita de **Aquaman** en Sicilio, **Nigra Rajo (Yahya Abdul-Mateen II)** vekiĝas vundita en ia laboratorio/metiejo. Tie li renkontas **D-ron Stephen Shin (Randall Park)**, kiu esploras lian armaĵon faritan laŭ la atlanta teknologio. Ambaŭ alvenas al konsento: **Nigra Rajo** kundividos kun **D-ro Shin** ĉion, kion li scias pri la subakvigita regno, dum la sciencisto promesas helpi la piraton en ties venĝo kontraŭ **Aquaman**”.*

En la filmo, reliefiĝas la juda-kristana mito de Kain kaj Abel, pro la terura batalo inter la duonfratoj **Arturo** kaj **Orm** cele al la konkero de la grandpova tridento de Neptuno, apartenanta al la simbola arsenalo de prapatra reĝo venkita de Atlantido. Kiamaniere sin lasas plenigi

la arketipoj de Patro, Patrino, *Puer*, *Se-nectus* en ni, multobla rolulo, kiu ni estas, ĉu ni sciu aŭ ne pri tio? Kiom da *personoj* ni veste surmetas, al kiuj ni identiĝas ĝis la bonvena kaj necesa alveno de la sen-iluziigo?

La paro *Animo-Animus*, komplementaj aspektoj de la homa psiko, rolas kerne en la rakonto. Dotita per granda fizika forto kaj militaj strategioj, Arturo fidas je sia kapablo, sed estas lia batalkunulino **Mera (Amber Heard)**, kiu lin inspiras kaj konsilas. Kiu, la plej bona irenda direkto? Jen la rolo de la *animo* por viro. **Arturo** sentas kulpon pro sia naskiĝo, pro supozebla suferita forlaso. Dum lia infanaĝo, panjo bezonis reveni al Atlantido pro devoj al sia gento. Ĝi do petis ne esti forgesata kaj promesis al la edzo kaj filo, ke ŝi revenos. Meze al la krudeco de gigantaj bataloj inter diversaj regnoj de profundaj regionoj de la oceano, kreskas la memkonscio de **Arturo**. Principe li rezistis al la ideo fariĝi reĝo kaj reganto de la Sep Maroj (nekonscio), konkeri siajn enajn povojn kaj la tridenton, simbolon pli altan de tiu faro. Nur post emociiga rerenkonto kun panjo, la unua vango de la *animo*, nia heroo kontaktas siajn emociojn, timojn, fidomankon, homajn trajtojn, tro homajn. Nur tiam li ekvidas la mision: liberigi sian popolon. Tiu mem-realigo nur okazos post la agnosko kaj akcepto de sia vera naturo, psika instanco nomata de Jung kiel *Self*, Si mem, *Imago Dei*.

Finfine, sed ne laste, post teruraj bataloj eksteraj, sed precipe enaj, tiu psika odio, samtempe persona kaj kolektiva,

permesos al la heroo, ni ĉiuj, la plenumon de la procezo de individuigo. Ĉu la ombra oceano de nia nekonscio iam fariĝos, eble nun, konscienco fakte konscia? Jen el la plej profundaj, ombraj, malhelaj regionoj psikaj elakviĝas, elakviĝas la konscienco de la Tuto, Edena Ĝardeno, Atlantido, ena mita paradizo. Ĝi simbolas nian originan riĉecon, povon, abundon, plenecon. Tiu luma heredaĵo estas plenrajte nia, ĉar *ni ekzistas, vivas kaj havas nian eston en la Spirito* el kie vere neniam ni estas aŭ estis apartigitaj. Ĉu fikcio tiu rakonto de la filmo? Ĉu fikcio nia odiseo serĉe al la esenca Esto? Kia fikcio estus tiu malkonata, mistera, senfina, poezia ekzistado nia? Ĉu la Poezio, kiu senĉese blovas en vi, mia kara **Aquaman**?




LA HOMO, KIU VIDIS LA SENFINECON

Anna Lobo

Direktoro: Mathew Brown
Aktoroj: Dev Patel, Devika Bhise, Jeremy Irons
Lanĉo: 22.09.2016 (Brazilo)
Tipo: Bibliografia filmo/ Dramo
Tempodaŭro
Lando: Britio

Tiu kiu akompanas miajn recenzojn povas rimarki ke mi ege ĝuas biografiajn filmojn. Ili ofte estas inspiraj, pro tio ke temas pri "herooj" kiuj superis malfacilaĵojn en siaj vivoj, kaj kiuj kiel ni ne havas superpovojn. Tio kuraĝigas nin sekvi niajn emojn, sonĝojn kaj koron. La filmo pri kiu mi parolos nun ne estos malsama. Ĝi temas pri barata matematikisto kiu nomiĝas Srinivasa Ramanujan. Mi entute ne konis lin. Do, iom pli koni pri lia vivo kaj pri tio, kiom li kontribuis por la disvolviĝo de matematiko siatempe estas mirinde.

Unu trajto de tiu ĉi filmo, kiun mi ege ŝatas estas la fokusigo je iu homo el Barato. Tio signifas multe, en mondo tiom usone kaj eŭropece centrita. Kiam temas pri homo kiu havas malsaman devenon kaj kulturon, tio estas iom ŝoka por la plimulto. Kiel la filmo montras, lia deveno montriĝis kiel vera



baro ĝis li iĝis respektata kaj konsiderata en la nova medio. Kiel vi povas imagi, ja veras ke ne ĉiam estas rozoj en tiu medio de eminentuloj. Kaj oni povas aldoni al tio la fakton ke tiam estiĝis mondmilito.

Ĝi estas tre kortuŝa kaj bela filmo. Ĝi estas tre bela omaĝo al tiu tute ne ordinara matematikisto el Barato, kiu plene revoluciis la matematikan konon kaj ankoraŭ faras tion. Eĉ se vi ne ŝatas matematikon, mi povas diri ke ĝi estas spektenda filmo, pro multaj aspektoj: pro mondmilita eco, homaj rilatoj, amikeco, akceptemo ... Mi povus senfine listigi bonajn kialojn.

Eble kelkaj aferoj povus esti pli bone prilaboritaj en la filmo, kiel la barata kulturo, familia problemo, la efiko de matematiko sur la ĉefan rolulon, kaj aliaj. Tamen, tio ĉio ne faras ke la filmo estu malpli spektenda. Ĝi nun estas trovebla en Netflix. Ni akompanu la historion de Ramanujan, kiu havis la

kuraĝon alfronti novan landon kun tute alia kulturo, kaj la misvojojn kiuj sinsekvis je tio. Ni kunĝoju tiun internacian amikecon, kiu iel fruktodonis - ĉar alie tiu kono estus tute perdita por ĉiam! Ni prenu momenton por ankaŭ havi fulmrigardon al la senfineco! Bonan spektadon!



EL LA VIVO DE FAJROBRIGADISTO LONGA TAGO

ALENCAR ESMERALDO

Alvenis la tago, kiam mi devis veni al insulo Anchieta [anŝieta], konata pro la ŝtelistoj, kiuj tie restas en malliberejo. Ĉi tiu insulo situas norde de la ŝtato San-Paŭlo, en la Urbo Ubatuba, proksime al kvartalo "Saco da Ribeira" [sako da ribejra].

En la antaŭtago, ni rekontiĝis en la kazono por ŝarĝi kamionojn por transporti materialon kaj manĝaĵojn uzotajn en la insulo. Post tiu laboro, ni ricevis la regalon reveni hejmen por ripozi ĝis la proksima tago, kiam ni ekvojaĝos je la kvara horo.

Mi memoras, ke ni malpacience atendis la tagon de la vojaĝo.

Fine, la horloĝo anoncis la trian horon, kaj mi ellitiĝis, banis min, brosis la dentojn, min razis, kaj venis al la kazono, kie ni renkontiĝis por vojaĝi al la insulo. La veturado de la kazono al "Saco da Ribeira" daŭris ĉirkaŭ kvin horojn.

Ni prenis la materialon el la kamiono kaj metis ĝin en la boaton, kiu kondukos nin al la insulo. Ni estas tre feliĉaj. Ni venos al la insulo per boato, en longa marveturado. Tamen, ĉi tiu feliĉo estingiĝis. La instruisto kun rideto demandis: "Ĉu vi estas feliĉaj?" Kaj ni respondis: "Jes, ni estas feliĉaj!"

Poste li aldonis: "Tre bone, ke vi estas feliĉaj. Mi esperas, ke vi plu estos tiaj, post tio, kion mi donos al vi."

Ni silentis, antaŭvidante ion teruran. La instruisto rompis la silenton per forta voĉo: "Lernantoj ĉi tie rajtas nur balkalsonon, maskon, piednaĝilon kaj enakvan spirtubon."

Ordonu estas ordono, kaj ni plenumis ĝin. Post ĉirkaŭ tri minutoj ni devus esti pretaj, male ni estus punitaj per serio da penigaj korpekzercoj. Silente ni plenumis la korpekzercojn.

Post la gimnastiko ni ricevis novan ordonon.

"Nun mi volas, ke vi ĉiuj eniru en la akvon. Mi atendos vin en la insulo. Kion vi atendas? Ek al naĝado ĝis la insulo!"

Ni tuj eknaĝis. Komence ĉio fluis bone, sed laŭ la pasado de la tempo, la lacegeco alvenis. Luj viroj eknaŭzis, kaj, kiuj devos veni en la boaton, tiuj estos malaprobitaj. Ni ne permesis tion, sed helpis la kunulojn, ĝis alveno al la kajo. Uf! Ni alvenis morte lacaj. Kiam ni ekpaŝis sur la sablo, ni tuj ekkuŝis por ripozi. Sed la instruisto tuj venis al ni kaj kriis: "Kion vi faras? Ĉu vi ripozas? Ĉiuj tuj iru al la transportado de materialo al la deponejo!"

La boato alvenis, kaj la materialon oni almetis sur la kajon. Ni apenaŭ sukcesis stari, ni suferis vertiĝon, la kruroj ne obeis al nia volo. Sed ni devis plenumi la ordonon.

Ni malfrue manĝis, kvankam ni tre malsatis. Sed la ofero ankoraŭ ne finiĝis. Post la tagmanĝo, ni ripozis dum unu horo, kaj sekve ni devis ekmunti la strukturon de loko, kie ni devos praktiki ekzercojn dum nia restado sur la insulo...

OCEANOJ RAPIDE VARMIGAS

Aleksandro Prado

Sciencistoj ĉe la Universitato de Kalifornio en Berkeley (Usono) trovis ke la homara kontribuo al varmiĝo de la oceanoj estas multe pli rapida ol antaŭe oni supozis, kio refutas la opinion ke la varmiĝo de la tero malrapidiĝis dum la lastaj 30 jaroj, laŭ raporto de la revuo Science. Oni kalkulas ke proksimume 93% el la suna energio kaptita de la gasoj, kiuj varmigas la teron, kuŝas en la oceanoj kaj tiujn ĉi varmigas. Tia varmiĝo de la oceanoj, laŭ analizoj, tute ne rilatas al aliaj naturaj fenomenoj kiel vulkanaj erupcioj, ekzemple.

Esploristoj analizis la datumojn pri la temperaturo de la mara akvo ĉirkaŭ du mil metrojn sub la surfaco, ĝia acideco kaj saleco kolektitaj, tiel ke la laboro permesis plibonigi ekzistantajn modelojn pri la klimata ŝanĝiĝo. Tiu esploro estis farita inter ĉinaj kaj usonaj sciencistoj; ili asertas ke la varmiĝo de la oceanoj plialtigos la marnivelon, tiamaniere ke la tuta klimata strukturo de la tero ŝanĝiĝos kaj tio kondukos al pli severaj ŝtormoj, uraganoj, pluvegoj inter aliaj.

En 2013, la Interregistara Spertularo pri Klimata Ŝanĝiĝo raportis, ke la varmega kresko de la oceanoj dum la

pasintaj 30 jaroj estas pli malrapida ol la aktualaj klimataj modeloj. Tamen, la ĉi-jara informo havigita de la lastaj esploroj elmontras ke la oceanoj varmiĝas multe pli rapide ol oni supozis. Ni estas en atentovekaj tempoj; la prezidanto de Usono neas la klimatajn ŝanĝiĝojn kaj ankaŭ la ministerio de Brazilo diris ke tio estas inventaĵo por ke la pliriĉaj landoj havu pli da povo super aliaj landoj. Tamen, tio temas pri scienco, estas aferoj kalkulitaj kaj analizitaj. Sed ni estas en tempoj kiam malmultaj homoj konvinkas la homaron pri neveraj ideoj, sed por sia celo. Se la celoj homojn movas, kian celon la homaro serĉas? Ni pripensu pri tio.

Referenco

How fast are the oceans warming? By L. Cheng, J. Abraham, K.E. Tremberth. SCIENCE 11 JAN 2019 : 128-129

PENTRAĴOJ SUR MURO

Ekde Mezepoko ĝis Rokoko

-Antonia Sobral

De la komenco de la homa vivo sur la Tero la homoj pentras sur surfacoj kaj tiel registras epokojn, lokojn kaj kutimojn de siaj vivmanieroj tra la tempoj. Riĉa estas la kolekto de tiuj pentraĵoj, kiuj laŭlonge de la historio ŝanĝiĝis ĉu rilate la neceson registri ion, ĉu rilate la intencon komuniki ion.

Post la Antikva Epoko (kies artikolo troviĝas en La Lampiro 151), gravaj registroj pri pentraĵo sur muroj okazis dum la Mezepoko. La arto de tiu periodo havis rektan influon de la roma arto de la Antikva Epoko kaj, rilate la murpentraĵojn, oni elstarigu la romanikan kaj gotikan.

La Romanika periodo de arto estis la lasta antaŭ la naskiĝo de la Gotika

periodo. La ĉefaj temoj de la pentraĵoj estis religiaj, ĉiutagaj scenoj, herooj kaj dioj mitologiaj kaj militaj konkerintoj. La tekniko fresko* estis tre uzita de la romanoj.



Eldrad forironta al Santiago de Compostela - Nekonata verkisto - Freskoj en la Kapelo de Sankta Eldrad kaj Sankta Nikolao, Abatejo de Novalesa, Piamonte, Italio

*Fresko estas pentraĵo per akvaj koloriloj sur freŝa stukaĵo de muro. La pentraĵo estas farita dum la stukaĵo ankoraŭ estas malseka, kaj stukaĵo kaj koloriloj kune sekigos.

La gotika arto ŝprucis cele kontraŭstari la severecon de la romanika arto. La karakterizaĵo, kiu elstaras plejparte en la gotika stilo-pentrarto, estas la serĉo de la realo en kreado de verkoj. Unu el la pentristoj, kiuj povas ekzempligi ĉi tiun serĉon por realismo, estas Giotto di Bondone, kvankam li reprezentis la transiron al la Renesanco. Li enkondukis la perspektivon en pentrarton.



Prezento de la Virgolino en la Templo, Cappella degli Scrovegni, Padua, Italio - Giotto di Bondone (1267-1337)

La Moderna Epoko sekvis la eŭropan Mezepokon.

La Renesanco estis grava transira periodo de Mezepoko al Moderno. Estis tempo de sciencaj kaj geografiaj



Fresko de Michelangelo, Kapelo Sistina.

malkovroj. Evidentaj estis la ŝanĝoj de homoj, la evoluo de kulturo kaj ideoj, la reviviĝo de la beletrio kaj arto, ĉefe en Okcidenta Eŭropo. La pentrarto liberiĝis de antikvaj modeloj sub la influo de la katolika eklezio, kaj la verkoj ekmontris verajn homajn formokorpojn kaj iliajn belecojn. Anstataŭ teocentrismo, venis la antropocentrismo. La tekniko nomata fresko estas tre asociita al itala renesanca pentrarto. Iliaj temoj estis ĉefe prireligiaj kaj la

plej famaj verkoj troviĝas sur la muroj kaj planfonoj de katedraloj kaj preĝejoj. La verkoj de Giotto donis eksterordinaran impulson al murpentraĵoj, kaj poste, grandaj majstroj de ĉi tiu tekniko lin sekvis. Citindaj estas Rafael, Botticelli, Ticiano, Michelangelo kaj Leonardo da Vinci.

Baroko sekvas Renesancon, inter 16-a kaj 18-a jarcentoj. La baroka arto estas konata pro detaloj, rafiniteco kaj eleganteco troigitaj. Ĝi aperis en la kunteksto de la kontraŭ-reformo kaj ankaŭ de multaj koloniaj riĉaĵoj kies verkoj inkluzivas ĉefe religiajn temojn.



Gloro de Sankta Ignazio - Plafona pentraĵo (iluzi plena) de Pastro Andrea Pozzo - en Preĝejo Sankta Ignazio di Loyola, Romo

Spertuloj kredas, ke la unuaj esprimoj de vere brazila arto aperis en baroka stilo, kiu en Brazilo okazis en la 17-a jarcento. La plej grava artisto de baroka arto estis Antônio Francisco Lisboa, kromnome Aleijadinho, sed li estis skulptisto kaj ne pentristo per freska tekniko. Citinda estas Manuel da Costa Ataíde, konata kiel Majstro Ataíde, grava artisto de la brazila arta stilo Baroko-Rokoko. Estis granda lia influo sur la pentristoj de sia regiono,



Ĉieleniro de Kristo, Preĝejo de Sankta Antono en Sankta Barbara, de Majstro Ataíde.

kiuj, ĝis la mezo de la 19-a jarcento daŭre uzis lian metodon de komponado, precipe en verkoj kun perspektivo sur la plafono de preĝejoj.

Post la periodo de la Moderna Epoko, pro la progresiva intereso pri aliaj teknikoj por ornamo, kiel tapiŝoj kaj vitraloj, la murpentarto falis en dekadencan en Okcidento, tamen vigle reaperis en la komenco de la 20-a jarcento.

LINGVAJ RESPONDOJ DE FRANCISCO WECHSLER

Demando

Ĉu oni devas uzi akuzativon post *kiel*, en la sekvantaj frazoj?
*Mi preferas manĝi freŝajn fruktojn, **kiel** pomoj, bananoj kaj melonoj.*
*En la filmo oni montris plurajn lokojn, **kiel** valoj, arbaroj, kampoj.*
*En lernejoj oni devas instrui gravajn lernobjektojn, **kiel** matematiko, biologio, geografio kaj historio.*

Respondo

Temas pri tikla punkto de la gramatiko, ĉar eblas uzi aŭ ne uzi la akuzativon, depende de la signifo dezirata. La sekvaj klarigoj baziĝas sur la *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (PMEG).

Se oni celas, ke la dua propozicio esprimu kvaliton similan al tiu esprimata en la antaŭa propozicio, oni ne uzu akuzativon, ĉar eblas subkompreni *tiajn*:

*Mi preferas manĝi freŝajn fruktojn, [tiajn], **kiel [estas]** pomoj, bananoj kaj melonoj.* (Alivorte, mi preferas fruktojn kun tia freŝeco, kiun havas, ekzemple, pomoj, bananoj aŭ melonoj.)

*En la filmo oni montris plurajn lokojn, [tiajn], **kiel [estas]** valoj, arbaroj, kampoj.* (Alivorte, oni montris lokojn, similajn al valoj, arbaroj kaj kampoj.)

*En lernejoj oni devas instrui gravajn lernobjektojn, [tiajn], **kiel [estas]** matematiko, biologio, geografio kaj historio.* (Alivorte, oni devas instrui lernobjektojn kun la graveco de, ekzemple, matematiko, biologio, geografio kaj historio.)

Jen unu plia ekzemplo, ĉerpita el la enkonduka retpaĝo de la *Tekstaro de Esperanto*: *Donacu al ESF kaj subtenu indajn projektojn, **kiel** la Tekstaro!*

Efektive, eblas uzi en la ĉi-supraj ekzemploj, sen ŝanĝo de signifo, la esprimon **kiel ekzemple**, anstataŭ la simpla **kiel**.

Kontraste, se oni celas, ke la dua propozicio esprimu manieron similan aŭ egalan al tiu esprimata en la antaŭkoma frazparto, oni ja uzu akuzativon:

*Mi preferas manĝi freŝajn fruktojn, [en la maniero,] **kiel [mi manĝas] pomojn, bananojn kaj melonojn.***

*En la filmo oni montris plurajn lokojn, [en la maniero,] **kiel [oni montras] valojn, arbarojn, kampojn.***

*En lernejoj oni devas instrui gravajn lernobjektojn, [en la maniero,] **kiel [oni instruas] matematikon, biologion, geografion kaj historion.***

Tamen Zamenhof uzis akuzativon post **kiel ekzemple**:

*[...] oni povas proponi al niaj kongresoj internaciajn sistemojn por la oportuneco kaj neŭtraleco de la rilatoj internaciaj, **kiel ekzemple internacian monsistemon, horsistemon, kalendaron** k.t.p., [...]* (Parolado ĉe la 3-a IKE)

*Sed en efektiveco ili devas posedi multe da aliaj ecoj, **kiel ekzemple:** alkutimiĝon al kiel eble plej preciza ordo, [...]* (Marta)

*[...] krom tio ili vendadis plej diversajn spicojn, **kiel ekzemple** safranon, anizon, zingibron kaj precipe pipron [...]* (Fabeloj de Andersen 3)

Ŝajnas, ke ankaŭ modernaj aŭtoroj emas uzi la akuzativon post **kiel ekzemple**:

*[...] oni povas trankvile ekkoni la mallarĝajn stratojn, la mezepokajn domojn, **kiel ekzemple tiun trinkejon**, [...]* (Monato)

*Tia mondmilito nome sekvigas ne nur profitojn, **kiel ekzemple pli altajn prezojn al la farmistoj**, [...]* (Kiam Ferdinando estis pafita, aŭt. Halldór Laxness, trad. Baldur Ragnarsson)

En ĉiuj ĉi-supraj frazoj, ŝajnas al mi klare, ke Zamenhof kaj aliuloj intencis esprimi per la dua propozicio ne manieron, sed kvaliton. Konklude, la praktika uzado ne ĉiam obeas la rekomendojn de PMEG.



ENTUZIASMA EVENTO EN LEGIO DE BONA VOLO

La 27-an de februaro 2019 okazis en la sidejo de Legio de Bona Volo (LBV) en San-Paŭlo, vigla evento. Por tio alvenis el Rio-de-Janeiro tri gejunuloj el la estraro de KarEJO - la loka Junulara Esperantista Organizo: Tamíris Queiroz, Matheus Arantes kaj Anderson Delgado. Ĉeestis ankaŭ tri reprezentantoj de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo. Matene, la Esperantistoj vizitis la instalaĵojn de la granda lernejo, kie studas 1500 infanoj kaj junuloj. Akompanis ilin la oficistoj en la departemento de Esperanto de tiu institucio. Ili tagmanĝis en la komuna restoracio.





Posttagmeze, la reprezentantoj de KarEJO dum tri horoj prezentis Esperanton al grupo da sepdek LBV-lernantoj. Tamiris kaj Matheus parolis pri la historio kaj celoj de Esperanto kaj Anderson transdonis bazajn informojn pri la gramatiko. La publiko entuziasme reagis.





Estas notinde, ke de iom da tempo LBV ĉiujare invitas Esperantistojn por tiaspeca informado pri Esperanto en sia sidejo, en San-Paŭlo. Krome, publikiĝas en ĝia interreta portalo informo pri la evento.



BEL-Konferencoj - 2019 -

Pouso Alegre | 19-20 Aprilo

**Centro Cultural Cleonice Bonillo Fernandes
Praça Senador José Bento, 2 - Centro Pouso
Alegre - MG - Brazilo**

PROGRAMO

19/04, VENDREDE:

13 h – Malfermo

13:30 h – “Alternativaj fontoj de energio” (Saulo Wanderley)

14:10 h – Publika diskuto

14:30 h – “La homo kaj la rido” (Mauro Progiante)

15:10 h – Publika diskuto

15:30 h – KAFPAŬZO

16 h – “Rotario Internacia” (João O. Veiga)

16:40 h – Publika diskuto

17 h – “Eldonprojekto Nia Juvelaro” (José R. Tenório)

17:40 h – Publika diskuto

18 h – PAŬZO

19:30 h – ARTA VESPERO

20/04, SABATE

9 h – “Reenkarniĝo” (Joel do Ó)

9:40 h – Publika diskuto

10 h – “Nigraj truoj en niaj hejmoj: kio post la necesujo?” (Alan Argolo)

10:40 h – Publika diskuto

11 h – “Dulingva Edukado de Infanoj” (Ísis O. Piton)

11:40 h – Publika diskuto

12 h – PAŬZO

14 h – “Kultivado de orkideoj” (Francisco Wechsler)

14:40 h – Publika diskuto

15 h – “La magio de kinoarto” (Joe Bazílio)

15:40 h – Publika diskuto

16 h – “Poezio surbloge loĝas” (Paulo Nascentes)


16:40 h – Publika diskuto

17 h – FERMO

La Lampiro 155:1

AERĴ - EASP
LORENA - 2-a
JUNIO 2019
Casa da Cultura -
R. Viscondessa de
Castro Lima 39

RENKONTO DE ESPERANTISTOJ EN LA PARAIBA VALO



PROGRAMO

9-a h - AKCEPTO
10-a h - MALFERMO
10:10 h - PRELEGO: TURISMO EN LA PARAÍBA
VALO (Cristina Graaf)
11-a h - KION VI PLANAS Nuntempe, AERĴ?
11:30 h - KION VI PLANAS Nuntempe, EASP?

12-a h - TAGMANĜO

14-a h - LINGVO-EKZERCO: "KIUN VORTON MI
KAŜAS?"
14:30 h - GUTO DA GRAMATIKO
15-a h - SPEKTADO DE FILMETO + DISKUTO
15:30 h - PRELEGETO + DISKUTO
16a h - LINGVO-EKZERCO: "FALSA AŬ VERA?"
17-a h - FERMO

**Venu praktiki
nian lingvon!
Lorena atendas
vin!**